

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro

N-ro 192

Sep – Dec 2014

Senneĝa Kristnasko, ĉu eblas tio?

Fernando Pita

Lumo de la Vero

Paulo Nascentes



Omaĝo
Geraldo Foriris

Babilado kun...
Paŭlo Sergio Viana

Trezoro je
Ĉies Dispono

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro

N-o 192

Sep - Dec. 2014

73-a jarkolekto

Redaktas: Fernando Pita

Aranĝas: Allan Argolo

Ĉi-numeraj kunlaborantoj:

Fernando Pita, Paulo Sérgio Viana, Alexandre Raymond, Maira Nobre kaj Paulo Nascentes.

Kovrilo:

Foto: Guto Costa / Fotos Públicas
Árvore de Natal Bradesco Seguros
Lagoa Rodrigo de Freitas, RJ




Associação Esperantista do Rio de Janeiro

Rua Teófilo Otoni, 135 / 302
telefone: 2467-4296

retadreso: aerjrj@hotmail.com

disvastigo.aerj@gmail.com


retejo: www.aerj.org.br



Rio Esperantista

Informativo da Associação Esperantista do Estado do Rio de Janeiro

Edição quadrimestral setembro - dezembro / 2010



Enhavo

El la Redakcio	_____	3
Intervjuo (PSV)	_____	5
Senneĝa Kristnasko,		
ĉu tio eblas?	_____	7
Junularo	_____	10
Trezoro je Ĉies Dispono	_____	10
Rakonto (Lumo de la Vero)	_____	12
Kvizo	_____	13
Omaĝo (Geraldo Foriris)	_____	14

Karegaj Geamikoj,

Finfine! Jen en viaj manoj nova numero de *Rio Esperantista*. Kaj, kiel anoncote de nia kara eksredaktisto Paŭlo Sergio Viana, tiu eldono estas ankaŭ la unua kies redaktado estas sub mia respondeco, do mi devas ekkomenci mian laboron persone pardonetante al la legantaro pro la granda prokrasto ekde la lasta eldono de nia *oficiala organo de AERĴ*.

Tamen, ĉi-tiu ne estas nur plia eldono, ĝi ja estas la deirpunkto de novaj planataj ŝanĝoj por *RE*. Oni klarigu: historie, *Rio Esperantista* havis diversajn fazojn, eldonitaj en tre malsimilaj niveloj, de multaj redaktistoj; ĉiuj homoj kiuj, laŭ siaj fortoj kaj kapabloj, prenis sur sin tiun lacegigan taskon. Sed tio havis certan prezon: ĉu *Rio Esperantista* estas nura bulteno, institucia informilo, aŭ simpla revueto de AERĴ? Ĉu ĝi parolu nur pri AERĴ aŭ pri la ŝtata movado en Rio-de-Ĵanejro? Ĉu en ĝi estas loko por pridiskuti lingvajn kaj literaturajn demandojn? Pro tio la tute neŭtrala nomo *oficiala organo*, ruza solvo por flankenlasi multe da demandojn, ĉu ne?

Tiu situacio ne devus daŭri longe, sed ja ĝi daŭris! Tamen, nuntempeco postulas de ni pli klaran sintenon, kaj oni



ne plu povis atendi por difini kiajn karakterojn *RE* havu. Do, ek al la ŝanĝoj! La unua el ili, kiu malfermas pordojn al ĉiuj aliaj, estas media: *Rio Esperantista* – fakte ĉiu ajn esperanta eldonaĵo – ĉiam estis limigita de la nurpapera medio en kiu ĝi estis eldonita. Pro tio, oni decidis akompani la nuntempon kaj ŝanĝi eldonadon al nurreta, kiu, krom meti finon al la citita limigo, ŝparas al nia kaso preskaj sendkostojn al la membroj. De nun *RE* alvenos ne plu al via poŝtkesto sed vi trovos ĝin en via retpoŝto, aŭ en via poŝfono, aŭ en via socia retumo, aŭ... ĉar mi neniel dubas ke, ekde nun, neniu leganto hezitu disvastigi *Rion Esperantistan* al siaj retamikoj! (Do, kiel oni diras rete, "pardonu nin se vi ricevu tion pli ol unu fojo")

Por signi tiujn transirojn al nova redaktisto kaj al nova medio, nenio pli oportuna ol intervjui la homon kiu ĝis nun ŝarĝis surŝultre la redaktadon de *RE*: nia kara Paŭlo Sergio Viana, kiu,

ĉiam afabla kaj sindonema, iome babilis kun ni pri kelkaj aferoj.

Vi trovos ankaŭ raporton fare de Alexandre Raymond pri la 1-a Karioka Renkontiĝo – KoRo, okazinta tuj antaŭ la 70-a Internacia Junulara Kongreso, du junularaj eventoj kiuj incendiigis la brazilan e-scenejon dum 2014. Fakte du raportoj estis planitaj, tamen pro nia malfruo unu el ili estis intertempe publikigita aliloke. Pro tio mi, por ne plu malfruigi *Rion Esperantistan*, anstataŭis ĝin por olda teksto mia. Bonvolu ne pensi pri tio kiel propagando de miaj beletraj talentoj, ĉar mi ilin ne havas.

Ni havas ankoraŭ tutnovan, neniam publikigitan tekston de la elstara poeto Paŭlo Nascentes, al kiu mi petis poemon por tiu eldono kaj li donacis al ni... rakonton! Multflanka verkisto

estas alia afero, kion fari? Nia karega amikino Maira Nobre skribis pri unu el la plej valoraj trezoroj de la karioka esperanta komunumo: la biblioteko de Kultura Kooperativo de Esperantistoj – KKE, sub ŝia respondeco.

En ĉi-tiu numero vi ankaŭ trovos nian etan, sed sinceran omaĝon al homo kiu briligis tutmondan Esperantujon: Geraldo Mattos. Nia simplega omaĝo al li estas farata (kiel li preferus) pere de publikigo de unu el siaj plej belaj poemoj.

Bone, mi esperas ke vi ĝuu tiun novan *Rion Esperantistan*, sed ne forgesu sendi al ni viajn laŭdojn, komentojn, kritikojn, bombleterojn, ktp. Ni dankos por ĉiuj! Kaj atendu novajn ŝanĝojn, ĉar "ĉio fluas", kiel tiu jam forfluganta jaro mem, kaj ĉar jam estas tempo por deziri:

Feliĉan Kristnaskon kaj Prosperan Novjaron!

Fernando Pita





Ekde tiu eldono de Rio Esperantista ni intervjuos samideanojn kiuj realigas atentigajn agadojn por nia afero, kaj neniu pli meritplena por inaŭguri tiun novan sektion ol nia karega eksredaktisto, tradukisto, verkisto, recenzisto radiisto, eĉ kuracisto! Kaj, finfine, laŭ opinio de kelkaj sopirantaj virinoj kiuj ĉeestis prelegon lian en kongreso: *la plej carma vira voĉo de Esperantujo!*

FP: *Vi estas tutlande agnoskata kiel te miajn klasikaĵojn...*

referenco pri lingvokonoj (kaj pri senlaca laboro por nia afero). Do ni petas de vi konsilon, kiel aŭtonome progresi en la lernado de E-o?

PSV: Dankon, sed mi ne estas referenco. Se vi scius, kiom ofte mi devas konsulti mian karan PIV-on kaj mian amikon PoMEGo... Kaj kiom ofte mi devas honti pro lingvaj stumbloj! (Feliĉe la samideanaro estas indulgema). Mia recepto por persona progreso en la posedo de nia lingvo estas jam konata, mi mem sekvas ĝin akurate. Ĝi konsistas el tri ĉefaj punktoj: unue, legi bonajn tekstojn ĉiutage, due legi bonajn tekstojn ĉiutage, trie legi bonajn tekstojn ĉiutage. Ne mankas bonegaj libroj por ĉiutaga legado. Mi

Tri punktoj por persona progreso en Esperanto: 1-e, legi bonajn tekstojn ĉiutage, 2-e legi bonajn tekstojn ĉiutage, trie legi bonajn tekstojn ĉiutage.

lastatempe miras konstati ekzemple, kiom multaj Esperantistoj ankoraŭ ne legis eĉ la Fundamenton! La samideanaro krokodilas ofte kaj legas malof-

FP: *Vi estas ja senlaca homo, kiu skribas, tradukas, verkas sonartikolojn por E-retradio, ktp; krom tio, vi estas ankaŭ kuracisto; kaj havas propran familion. Kiel vi sukcesas administri vian tempon por tiomaj taskoj? Ĉu estas speciala formulo?*


PSV: Vere mi lasas en miajn tagojn malmulte da libera tempo. La vivo estas mallonga kaj la farenaĵoj, abundaj, ĉu ne? La sekreto estas agi kun ĝojo. Esperanto agado donas al mi profundan ĝojon, kiu kompensis dum mia tuta vivo la malĝojon kunvivi vadi kun la sufero de la pacientoj.

Medicino estas nepre peza profesio. Kaj kiam oni laboras kun ĝojo kaj kun kompatemo, tiam la laborado estas mallastatempa, pli laciga. Cetere, korpa kaj mensa aktivado estas saniga vivmaniero. Rilate al la familio, mi devas konfesi, ke mi edziĝis al iaspeca sanktulino...

FP: *Pri via krea proceso: vi jam tradukis multon, sed kiam vi donacos al ni ian originalan Vianaĵon?*

PSV: Miaj originalaĵoj jam aperis, sed dise. Precipe en revuoj. Nuntempe, mi verkas en blogo (**blogdopaulosergioviana.blogspot.com.br**) kaj dankas por via vizito kaj komentoj. Mi planas tamen baldaŭ publikigi kolekton da originalaj rakontoj. Mi devas trovi tempon por organizi ĝin...

FP: Fine, decidis la Senkorpa Mistero ke mi anstataŭu vin en *Rio Esperantista*, do kiaj konsiloj vi povas doni al kiu sin dediĉu al aperigado de esperantaj revuoj kaj bultenoj?



PSV: Sincere, mi diras, ke vi ne bezonas konsilojn. Vi certe bonege plenumos la taskon kaj nia revuo faros

salton antaŭen laŭ kvalito kaj influo kaj kapablo. Persone, plaĉus al mi trovi anguleton por literaturo. Krome, temoj koncernantaj la modernan mondon kaj la internacian lingvoproblemon estas daŭre gravaj por loki nian kulturon en nian epokon. Kaj kontribuoj de eksterlandanoj donus pli vasthorizontan koloron al la revuo. Mi estas preta por aplaŭdi vin!

Esperanto agado donas al mi profundan ĝojon, kiu kompensis dum mia tuta vivo la malĝojon kunviviadi kun la sufero de la pacientoj.

Komento de la redakcio: Mi ne diris antaŭe ke li ja estas afabla kaj ĝentila? Tamen, mi persone kredas ke mi ne meritas tiom da fidemo de nia kara intervjuito, sed mi promesas fari mian plejbonon por valorigi liajn vortojn...

Ĉu vi vere ne scias kion donaci en la sekreta amiko de via esperanto-grupo? Jen

Penseroj,

Debuta poemplibro de Maria Nazaré Laroca, kortuŝaj poemoj kiuj pensigos vin.

Disponebla en nia libroservo, mendebla ĉe nia retpaĝo www.aerj.org.br

Iam mi ricevis de eŭropaj gesamideanoj jenan demandon: Kiel vi festas Kristnaskon se nun estas printempo ĉe vi? Aspekto simpla demando... sed, atentante pri la afero, mi rimarkis ĝian tutan nesimplecon: priskribadon ne sufiĉus, gravus scii kiajn tradiciojn oni heredis de Eŭropo, kaj kiaj estas propre niaj. Mi konfesas ke tiu demando momente terurugis min, ĉar mi devus distranĉi la feston por ĝin respondi, sed... por demando farata, respondo devigata. Do jen mia humila provo klarigi al vi kiel oni povas festi kristnaskon sen neĝo, tia neĝo kiun mi kuriozas iutage finfine vidi.

Kiel ekskoloniinta nacio, Brazilo “lernis” Kristnaskon de la katolikaj portugaloj, kaj iliaj tradicioj eble ne multe malsimilas al tiuj de alieŭropanoj. Tamen, al la formado de brazila popolo ankaŭ multe kontribuis indiĝenoj kaj sklaviĝintaj afrikanoj. Poste enmigradis Brazilen diversaj civitanoj el aliaj eŭropaj landoj: germanoj, poloj, italoj kaj hispanoj, precipe. Do niaj festoj, inter ili Kristnasko, multege ŝuldas al tiuj homoj.

Nia kristnaska tempo komenciĝas la 8-an dec., tago de Nia Sinjorino “*da Conceição*” (la Naskiganta), kiam ni prenas pinarbojn – ĝenerale plastikaj,

ĉar la veraj estas raraj en Brazilo – ornamas ĝin per multkolorajn vitrajn sferojn, steletojn, donacetojn, ktp. Oni ankaŭ demetas “*Prezepion*” sub la arbo, tio estas: statuetoj reprezentantaj la manĝejon kie Li naskiĝis, kaj ankaŭ la paŝtistojn, la Sanktan Familion, la Magiajn Reĝojn (tiamaniere oni nomas la saĝulojn kiujn vizitis Lin). Spertuloj diras ke tiel kuniĝas du tradicioj: tiu de la germandevena pinarbo kaj tiu de la sud-eŭropa prezepio.



Brazilanoj malamas horprecizecon – ne forgesu ke ni estas latinidoj, tute ne britdevenaj – do ni ĉion faras for de la ĝusta horo: por tio ni festas Kristnaskon ne dum la 25-a Dec., sed dum la nokto de 24-a!, ĉar ni, sciante ke Li naskiĝis la 25-an, sed ne je la kioma, povas anticipi iomete la aferojn, ĉu ne? Frekvente ni nur ekpreparas la pladojn la 24-a mem tingas

(posttagmeze, kial kuri?) Respektante katolikajn tradiciojn, multaj familioj nur manĝas post la noktomezo, reveninte el la *Koka Meso*, sed samtempe brazilanoj malrespektas tradiciojn, do ne raras ke ni ekkomencu manĝi (kaj trinki!, kaj drinki!) nur la pladojn estu pretaj, kaj poste ni (kelkfoje volonte) tute forgesas la meson! Sed kio distingas Kristnaskon de aliaj brazilaj festoj estas la fakto ke ĝi estas tute familia okazintaĵo, tuta familio kutimas renkontiĝi tiaepoke (nerare tia estas nura dumjara fojo) por escepte inviti nefamilianon al la festo estas ĝenerale necesa ke tiu estu tre intima al la tuta familio, aŭ ke tiu ne havu familion. Kompreneble gekonuloj intervizitas sin, sed nur je la 25-a, ĉar tie la “kristnaska nokto” pasis jam.

Dum festo plenkreskuloj interŝanĝas donacojn aŭ ludas la “sekretamikon”, kiam oni donacas ion al iu antaŭe sortlanĉita kaj pri kies nomo oni tenas sekreton ĝis la festo. Sed geinfanoj kiuj estis bonkondutaj dum la tuta jaro povas atendi la viziton de “*Papai Noel*” (Avo Frosto, t.e. Sankta Nikolao) demetante ĉe la fenestro siajn ŝuetojn, por ke apude li lasu la donacojn kiujn ili perletere nordpolen petis. Evidente en Brazilo Sankta Niko-

lao devas lasi donacojn ĉe la fenestro, ĉar ĉi-tie nenia domo havas fajrejon nek fulmtubon! Oni tradicie reprezentas lin: longbarba olduleto ruĝvestita, kondukanta glitveturilon tiritan per flugantaj boacoj. Mi pensas ke li devus uzi tropikajn vestojn, kiam li pasas tra Brazilo kaj aliaj sudhemisferiaj landoj...

Ankaŭ tre muzikema, brazilanoj kutimas ludi aŭ aŭdi kristnaskajn tradiciajn kanzonojn. Kelkaj eŭropaj, kiel la germana “*Nokto Feliĉa*”; aliaj brazilaj, (mia preferata estas *Anoiteceu*, t.e. “Noktiĝis”). Sed tio dependas de la ĝojeca grado, ĉar la plimulto opinias tiajn kanzonojn iom tristaj, do ni ludas danceblajn muzikojn, kiel sambo, karnavalaj muzikoj, ktp. Mankante nur du monatoj por nia mondfame konata Karnavalo, ni devas prepariĝi, ĉu ne?

Kion ni manĝas? Tio multe varias tra la lando, sed en Rio-de-Ĵanejro kaj San-Paŭlo oni kutimas prepari diversdevenajn pladojn: portugala alozo *laŭ Gomes Sá*, nordamerika ŝinko *laŭ Kalifornio*, fine tiu *mi-ne-scias-el-kie* rostita meleagro. Oni ankaŭ manĝas nuksojn, avelanojn, kaŝtanojn ktp. Tiuj fruktoj, kiuj oni nur vidas tie-ĉi dum tiu epoko, estas veraj specia-

laĵoj! Ĝenerale oni manĝas ankaŭ “dolĉajn salatojn”, el tropikaj fruktoj kiel mango, akajuo, ananaso, melono, banano, oranĝo, kelkfoje eĉ persikoj, vinberoj, fragoj kaj prunoj! En aliaj regionoj de Brazilo oni kutimas manĝi ŝafidojn, kapridoj, porkoj. En Amazonio kutimaj estas armadeloj, anaso “*ao tucupi*”, mandiokaj kukoj, kaj regionaj fruktoj: *açaí*, *murumuru*, *camu-camu*, *acerola*, ktp.

Brazila estas drinkema popolo – ni estas la duaj plejnombraj biertrinkantoj de la mondo, esperante iutage venki la germanoj pri tio – sed por Kristnasko la plejmulto preferas vinon, tio kio kaŭzas fortajn efektojn kiam trinkita sub 40°C! (ne forgesu: estas somero tie-ĉi, kaj nokte estas ja varma, eĉ se ni havas tropikajn some-rajn ŝtormojn)

Kaj jen ni alvenas celen: la varmeco. Komencite je la 21-a dec., somero ne estas ankoraŭ forta dum Kristnasko! La temperaturo estas pli malpli 32/35°C ombre, kompreneble ni vestas la plej malpezajn vestaĵojn disponeblajn. Frekvente neblanka vesto, ĉar la kutimo estas vesti blankajn teksaĵojn nur dum Novjara Festo. Ne estas do la kutimo dum Kristnasko “inaŭguri” vestaĵojn. Dank’al Di’!, ĉar dancante la tutan nokton oni mul-

tege ŝvitas, kaj pezajn vestojn tute malhelpas tion. Sed oni ne pensu ke ni ne sopiras la eŭropan malvarmon: la eŭropa deveno de la festo markiĝis en ni; pro tio niaj kristnaskkartoj ĉiam reproduktas blankneĝajn scenojn.

Por fini, sufiĉas diri ke kvankam ĝi havas la karakterojn sube priskribatajn, malfeliĉe Kristnasko ne estas la festo plej ŝatata de brazilanoj. Oni diras ke estas festo por rememoraĵoj de la foririntoj, malĝoja por la restantoj, ktp. Mi kredas ke tio devenas el la tro familia karaktero ke ĝi havas en Brazilo. Mem Novjaro estas pli festata, kaj la kristnaska epoko finiĝas je la 6-a jan. (Tago de la Magiaj Reĝoj) kiam ni denove gardas la plastikajn pinarbojn. Ververe Kristnasko estas malpli grava por ni ol Karnavalo aŭ Novjaron.

Mi kredas ke la legantoj jam konstatis kelkajn diferencojn inter la “tropika” Kristnaskon kaj tiu de la norda duonsfero. Kiom da? Tion mi mem ne kapablas diri, sed mi ŝatus scii, sammaniere mi revas iutage vidi neĝon. Sed mi esperas ke neniu neu nek la eŭropan devenon de la festo, nek la modifojn faritajn de amerikanoj, rezulto de adaptado de eŭropa kulturo al nova kontinento.

Sukcese Okazis la 1-a KoRo en Rio

Ĵus antaŭ la IJK en Fortalezo, okazis en Rio-de-Ĵanejro (de la 14-a ĝis la 18-a de julio) por la unua fojo la renkontiĝo KoRo – *Karioka Renkontiĝo* – kiu kunigis homojn el pli ol deko da landoj, plejparte junuloj. Dum la renkontiĝo okazis ekskursoj al la diversaj vidindaĵoj de Rio, inkluzive paŝumado por supreniri la sukerpanon: la esperantistoj glitis en la ŝlimo, iris inter la arboj, renkontiĝis simietojn kaj ŝvitante alvenis al la supro de la monto por manĝi merititan glaciaĵon admirante la vidon al la tuta urbo.

La nokta programo okazis en la kongresejo, ABENA, kiu troviĝas en la kvartalo Kampo Granda, okcidenta regiono de Rio. Tie, post komuna kuirumado, ni profitis la nokton por

kanti kune, kungi gitaro ludanta kanzonojn esperantistajn, brazilajn, rusajn, germanajn, ktp en paka kaj feliĉiga etoso.

Ĉiuj partoprenintoj de KoRo revenis al siaj hejmoj kun mirindaj memoraĵoj de Rio, kaj en tiu senco, oni povas diri ke ĝi estis granda sukceso, kaj oni jam atendas la 2-an KoRo-n.

Amuziĝo tute ne mankis, ĉu ne, Renan?



Trezoro je Ĉies Dispono

Maira Nobre

Biblioteko de Kultura Kooperativo de Esperantistoj havas, hodiaŭe, iom pli ol 1.200 titoloj en aŭ pri Esperanto. Tiu estas grandioza provizo kie oni povas trovi librojn originale verkitaĵoj en nia lingvo, tiel kiel: *Grekaĵoj Papi-rusoj* de Julius Penndorf (1927); *Historio de la Lingvo Esperanto*, de Edmond Privat (1927); *Aldono Al La*

Dua Libro de Lingvo Internacia de L. L. Zamenhof (1925); *Saltego Trans jarmiloj* de Jean Forge (1924); *Pro Ĵstar* de H. A. Luyken (1924); *Vojo kaj Vorto* de Roberto Passos Nogueira (1972); *Esperantaj Poemoj* de C. C. Droogendijk (s/d); *Viktimoj* de Julio Baghy (1921); *Printempo en la Aŭtuno* de Julio Baghy (s/d); *Orig-*



nala Esperanta Bildvortaro de Sylla Chaves (1990); *La Ŝtona Urbo* de Anna Löwenstein (1999); *Ili Vivis Sur la Tero* de Maryvonne kaj Bruno Robineau (1998); *Ekstremoj* de Fernández kaj aliaj. (1997); *La Monto* de István Nemere (1995); *Faktoj kaj Fantazioj* de Marjorie Boulton (1993), inter diversaj aliaj.

Tradukoj de beletraĵoj, kiel, ekzemple: *Hamleto* de William Shakespeare (1929); *Patroj kaj Filoj* de I. S. Turgenev; *La Morto kaj Morto de Kinakas Akvobleko* de Jorge Amado (1980); *La Knaboj de Paŭlo-Stratoj* de Francisco Molnár (s/d); *Songô de Somermeza Nokto* de William Shakespeare (s/d); *Norda Odiseado* de Jack London (s/d); *La Sekreta Kaŭzo kaj Aliaj Rakontoj* de Machado de Assis (2011); *La Homo, kiu Scipovis la Javan Lingvon* de Lima Barreto (2009); *La Horo Kaj La Vivo de Aŭgusto Matraga* de Guimarães Rosa (1997); *Lirikaj Perloj de Al-Andalus* de Antonio Marco Botella (1995); *La Respubliko* (πολιτεία) de Platão (1993), inter aliaj egale signifaj.

Lingvistikaj aŭ metodologiaj verkoj riĉigas la provizon, kiel la sekvantaj: *La Bona Lingvo* de Claude Piron (1989); *Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto* de John Wells (1989); *La Fenomeno Esperanto* de William Auld (1988); *Esperanta Bildvortaro* de Rüdiger Eichholz (1988); *Esperantaj Sinonimoj* de Jaan Ojalo (1999); *La Vort-Strukturo de Esperanto* de René de Saussure (1985); *Falsaj Amikoj de Esperanto* de R. Bernard kaj A. Ribot (1971); *La Tuta Esperanto* de Henry Seppik (1971), inter aliaj saminteresaj libroj.

Aktuale oni katalogas la lastajn titoloj kaj, plej baldaŭ, la tutan provizon estos laŭdevice etikedita, kun la koresponda kodnumerigo. Krome, en tiu biblioteko estas multe da esperantistaj revuoj kaj, en estonta numero de *Rio Esperantista*, oni prezentos ties liston, ĉar ankaŭ estas nun en kataloga procezo.

En tiu Novjaro, ne forgesu (re)aniĝi al AERĴ!



Lumo de la Vero

En iu bela kaj suna tago, kiam miaj du filoj estis infanoj, ili ludis sur la planko de granda *preĝejo*¹. Dum longa tempo, ili atente rigardis *formikojn*², kiuj rapide iris kaj revenis de unuflanko al la alia de malgrandaloko, sed ili neniam trapasis nigran linion.

“Vidu, Ŝande! La formikoj de la flava triangulo ne trapasas la nigran linion. Ili ne iras al la ruĝa triangulo. Ili ne iras al la verda triangulo. Ili ne iras al la blua *rektangulo*³. Ili restas en la flava triangulo dum la tuta tempo.”

“Estas vere, Ĥafa! La formikoj de la ruĝa triangulo ankaŭ ne trapasas la nigran linion. Ili ne iras al la blua rektangulo. Ili restas en la ruĝa triangulo dum la tuta tempo. Kial tio okazas?” Venis aliaj demandoj. Kial ili restas en sia propra loko? Kial ili ne iras al la loko de aliaj formikoj? Tio estas *mistero*⁴!

Ŝande diris: “Ho, certe flavaj formikoj timas la aliajn.” Formikoj kompreneble estas flavaj! Tiel opiniis la flavaj formikoj. Tiuj malsamaj formikoj estas strangaj. Formikoj ruĝaj, verdaj aŭ bluaj estas vere strangaj.

Ĥafa respondis: “Jes! Kaj la ruĝaj opinias, ke formikoj estas ruĝaj.


Kompreneble bluaj, verdaj kaj flavaj formikoj estas tute strangaj.”

Sed sur la mistero venis lumo. Blanka lumo venis sur la mistero. Subite Ŝande komprenis la misteron. Finfine li vere komprenis tiun misteron.

“Rigardu supren, Ĥafa! Rigardu al la multe kolora *vitralo*⁵. La vero estas simpla. Kiam la blanka lumo de la suno pasas tra la diversaj koloroj de la vitralo, la formikoj aspektas flave, ruĝe, verde kaj blue!”

“Do la formikoj vere ne estas malsamaj, ĉu?” Ĥafa demandis.

“Tute ne”, respondis la frato. “Ili nur ŝajnas esti malsamaj. Ili ŝajnas esti el diversaj koloroj, sed vere tiuj formikoj vivas en *fantazio*⁶. Ili aspektas flave, ruĝe, verde kaj blue!, ĉar la blanka lumo pasas tra la diversaj malsamaj pecoj de koloraj vitroj de la vitralo, kaj...”



La fino de tiu parolado estis vera *surprizo*⁷ por mi. Mia plej juna filo venis al interesa punkto ne pri formikoj, sed pri homoj. Kun inteligenta rideto, li demandis: “Ŝande, la formikoj vivas en fantazio! Ĉu homoj ankaŭ ne vivas en fantazio? Multaj homoj pensas, ke ili estas malsamaj. Malsamaj koloroj, malsamaj religioj, malsamaj lingvoj, sed la vero estas nur unu: la blanka lumo de la suno estas sur ĉiuj.

Vere ni ĉiuj estas homoj, simplaj homoj, ĉu ne?

¹ Preĝi: paroli al Dio; preĝejo: loko kie ni preĝas.

² Insekto vivanta en grandaj bone organizitaj popoloj sub tero aŭ en memfarita monteto.

³ Figuro el rektaj linioj kun kvarrektaj.

⁴ Afero kaŝita aŭ ne klarigebla.

⁵ Kunaĵo el diverskoloraj pecoj de vitro, kunigitaj per plumbostrioj por formi desegnojn.

⁶ Krea imagpovo; kaprica elpenaĵo; fantazii: tiel imagi aŭ elpensi aferojn.

⁷ Surprizi; veni aŭ fari ion neatendite; mirigi per io ne atendita; mirigi, ĉar ne atendita.

Por tiuj kun Karioka Animo

Kvizo

Havi kariokan animon ne estas privilegio de kiuj naskiĝis en la Mirinda Urbo, sed por tiuj kiuj sentas sin hejme, amas kaj spiras la belegan etoson kiuj ĉirkaŭas nin. Do jen demando por vi: Kiu estas tiu loko?

La unua ĝusta respondo alveninta al la retpoŝto de la redakcio ĝis la 10-a de januaro, gajnos libron! (Ne forgesu enmeti KVIZON en la titolo de la mesaĝo, ĉu?)

Respondo en la venonta numero!





Ĉi-jare nia sitata medio; brila poeto kiu enkonmovado suferdukis novajn stilojn en la esperantaris unu el siaj poezio, kaj fine, eksprezidento de plej grandaj Akademio de Esperanto, Geraldo la- perdoj, ĉar sis por ĉiu esperantista brazilano du- forpasis Prof- oblan kialon por orgojlo: esti lia ro D-ro Ge- samlandano kaj samlingvano. (Oni raldo Mattos. diras ke orgojlo estas mortiga peko, Krom espe- sed ni estas homoj, ĉu ne?) rantisto kiu

flue parolis eĉ la latinan, Geraldo es- tis ankaŭ lingvisto kiu multe skribis pri nia lingvo kaj kiu multe batalis por faligi la fortegajn antaŭjuĝojn kontraŭ Esperanto en brazila univer-

Inter la multaj poemlibroj de Geraldo, estas verkoj kiuj ja estas kaŝitaj per- loj, kiel la ĉi-suba Nesociemo, el sia libro Arĉoj, lanĉita de Stafeto en 1967:

Kunvivi kun aliaj estas triste,

Se nia koro bolas de la vervo

Aspiri fantazion per la servo

De ritmoj puŝigantaj senreziste...

Dum kelkaj min konsilas kateĥiste

Konduti dece, pensas mia cerbo:

Mi volus kuŝi sur soleca herbo

Aŭdante la naturon, egoiste...

Min nomas kruda amikoj, ĉar en rondoj

Mi lasas la demandojn sen respondoj

Kaj en silento novajn vivojn kreas...

Ho lasu, lasu min en ritmomiro,

Ĉar mi klopodas, per la versinspiro,

En revoj ĝui, kion vivo neas...

Baldaŭ Lanĉota!


Ĉu vi havas amikon al kiu vi volas instrui Esperanton, sed kiu jam studas alian lingvon?

Ĉu vi volas lerni alian lingvon pere de Esperanto?

Ĉu vi jam parolas aŭ studas Esperanton, aŭ la anglan, la francan, la hispanan aŭ eĉ la portugalan!, sed estas multe de aferoj kiuj vi volas lerni sed ne trovas en viaj libroj?

Jen la solvo!!! Baldaŭ vi disponos *Kvinlingvan Vortareton*, kie vi povos akiri aktualan kaj modernan vortostokon en 5 idiomoj.

Ne nur por esperantistoj, ĉar Esperanto estas lingvo ĉies, ĉu ne?



Baldaŭ en via preferata libroservo



Rio preparas la Jubilean Kongreson.
Ne aŭdacu maltrafi ĝin:
Aliĝu tuj!

50^a Brazilia Kongreso de Esperanto

35-a Brazilia Esperantista Junulara Kongreso

Rio de Janeiro

23a - 27a de januaro 2015

temo:

Ĝra Jubilea Kongreso - Ĉu, ni Sukcesis?

organizado



Associação Esperantista de
Rio de Janeiro

aŭspicio



Brazilia Esperanto-Ligo



apogo



50-a bke



aliĝoj kaj informoj:

aerj.org.br

esperanto.org.br

esperanto.com.br

aerj.org.br
esperanto.org.br/adesao



50^a bke
Rio de Janeiro 2015